

# Tokipono

Tokipono estas konstruita lingvo, kreita de kanada lingvisto kaj tradukisto Sonja Lang en 2001. Ĝi estas eksperimento esplori minimumecon de lingvo.

Ĉi paĝflanko priskribas la tutan gramatikon, la alia paĝflanko enhavas la tutan vortaron.

Ĉi Klariga folio fare de blinry, CC0. [blinry.org/toki-pona-cheat-sheet/](http://blinry.org/toki-pona-cheat-sheet/)

Tradukita de Vaughn Seward.

## Alfabeto

Tokipono utilas naŭ konsonantojn (*j k l m n p s t w*) kaj kvin vokalojn (*a e i o u*). Prononco ne multe gravas.

## Bazaj frazoj

La partikulo *li* apartigas la subjekton kaj la verbon:

*soweli li moku.* = *La kato manĝas.*

*jan li lape.* = *La persono dormas.*

Ne estas verbo "esti"; la parto post *li* povas esti aŭ substantivo (o-vorto) aŭ adjektivo (a-vorto).

*kili li moku.* = *Fruktoj estas manĝaĵo.*

*telo li pona.* = *Akvo estas bona.*

*telo li moku.* = *Akvo estas trinkaĵo.*

Se la subjekto estas *mi* aŭ *sina*, *li* estas ĉiam ellasita.

*mi moku.* = *Mi manĝas.*

*sina pona.* = *Vi estas bona.*

## Ambiguelo

Tokipono havas multe da ambiguelo. Vi ofte bezonas scii la kuntekston por determini la signifon. Ekzemple, verbo ne havas tenzon:

*mi moku.* = *Mi manĝis/as/os.*

Multaj vortoj havas multoblajn aŭ ĝeneralajn signifojn:

*soweli = kato / hundo / (ajna termamulo)*

*kili = (ajna frukto aŭ legomo)*

Multaj vortoj povas ludi la rolon de substantivo, adjektivo aŭ verbo:

*telo = akvo / malseka / lavi*

*pona = bona, simpla / ripari*

Substantivoj ne havas singularon/pluralon, nek difinitan/nedifinitan artikolon:

*kili = frukto / la frukto / kelkaj fruktoj / la fruktoj*

## Rektaj objektoj

La partikulo *e* apartigas rektan objekton de la antaŭo de la frazo.

*soweli li moku e telo.* = *La kato trinkis la akvon.*

*mi telo e soweli.* = *Mi lavas la katon.*

## Modifantaj vortoj

Vi povas modifi vortojn aldonante aliajn vortojn:

*jan lili = homo eta = infano*

*tomo mi = domo mia*

*pilin pona = senti bona = esti feliĉa*

## Negacio

Por neigi vorton, almetu *ala*:

*mi lape ala.* = *Mi ne dormas.*

*jan ala li toki.* = *Neniu parolas.*

## Demandoj

Por demandi jes-aŭ-ne demandojn, ŝanĝu la verbon al "(verbo) *ala* (verbo)":

*sina ken ala ken lape?* = *Ĉu vi povas dormi?*

*soweli li wile ala wile moku?* = *Ĉu la kato malsatas?*

Alternative, almetu *anu seme* ("aŭ kio") al la frazo:

*sina wile uta e mi anu seme?* = *Ĉu vi volas kisi min?*

Por respondi al ĉi tiuj demandoj, respondu per "(verbo)" aŭ "(verbo) *ala*".

Por demandi aliajn demandojn, (ne 'jes' aŭ 'ne'), skribu normalan frazon kaj anstataŭigu la koncernen vorton per *seme*:

*sina moku e seme?* = *Vi manĝas kion?*

*seme li moku e kili mi?* = *Kiu/kio manĝis mian frukton?*

## Modifante vortojn per *pi*

Por modifi esprimon konsistanta el grupo de vortoj, apartigu ilin per la partikulo *pi*. Ĝi ofte povas esti konsiderita kiel "de". Rimarku la diferencon:

*tomo telo nasa = freneza akva domo = stranga necesejo*

*tomo pi telo nasa = domo de la freneza akvo = drinkejo*

*jan wawa ala = neniu fortaj homoj*

*jan pi wawa ala = homoj de ne-forteco = malfortaj homoj*

## Provizante kuntekston uzante *la*

Por aldoni kuntekston al frazo, antaŭmetu alian frazon aŭ esprimon, sekvante per *la*. Ĉi tiu ofte donas frazformon kiel "se (parto 1a), tiam (parto 2a)" aŭ "En la kunteksto de (parto 1a), (parto 2a)".

*mi lape la ale li pona.* = *Kiam mi dormas, ĉio estas en ordo.*

## Tempo

Vi povas uzi *la*-subfrazon por aldoni tempan kuntekston al frazo:

*tenpo ni la mi lape.* = *Nun mi dormas.*

*tenpo kama la mi lape.* = *Mi dormos en la estonteco.*

*tenpo pini la mi lape.* = *Mi dormis en la estinteco.*

## Kunmetaĵaj frazoj

Disigi plurajn subjektojn en frazo uzante *en*:

*lapo en moku li suli.* = *Dormo kaj manĝaĵo estas gravaj.*

Por diri, ke la subjekto faras pli ol unu afero, vi povas uzi plurajn *li*-subfrazojn;

*pipi li moku li pakala.* = *La insekto manĝas kaj detruas.*

Se estas kelkaj rektaj objektoj de la sama verbo, vi povas uzi plurajn *e*-subfrazojn:

*mi moku e kili e telo.* = *Mi konsumas frukton kaj akvon.*

## Neoficialaj vortoj

Neoficialaj vortoj (kiel nomoj de landoj, lingvoj, aŭ popoloj) estas majuskulitaj kaj traktataj kiel adjektivoj. Neoficiala vorto estas afiksita al substantivo, kaj ofte estas simpligita al la limigita alfabeto de Tokipono:

*mi jan Kapilo.* = *Mi estas Gabrielo.*

*ma Kanata li pona lukin.* = *Kanado estas bela.*

*mi toki ala e toki Inli.* = *Mi ne parolas la anglan.*

*ma tomo Nujoka li suli.* = *Novjorko estas granda.*

## Prepozicioj

*lon*, *kepeken*, *tawa*, kaj *tan* povas uzitaj kiel prepozicioj ĉe la la fino de la frazo:

*mi moku lon tomo.* = *Mi manĝas en la domo.*

*mi moku kepeken ilo moku.* = *Mi manĝas per forko.*

*sina pona tawa mi.* = *Vi plaĉas min = Mi ŝatas vin.*

*sina tawa weka tan seme?* = *Kial vi foriras?*

## Ordonoj

Por deklari ordonon, uzu *o* kaj poste, kion vi volas la persono faru:

*o lukin e ni!* = *Rigardu ĉi tiun!*

Por alparoli al iu, komencu la frazon per "(persono) *o*":

*jan Malin o, sina pona lukin.* = *Malino, vi estas bela.*

Vi ankaŭ povas uzi ĉi tiun kunkune kun ordono, kunfandante la du *o*-vortojn:

*jan San o tawa tomo sina.* = *Sam, iru hejmen.*

## Nombroj

Kombinu nombrovortojn por adicii ilin:

*wan = 1 tu = 2 luka = 5*

*luka luka tu wan = 13*

## Kaj... jen, ĉio!

|                         |   |                 |  |               |  |                |  |
|-------------------------|---|-----------------|--|---------------|--|----------------|--|
| <b>a</b>                | (emfazo, emocio aŭ konfirmo)  | <b>ku</b>       | interagi kun "Toki Pona Dictionary" (vortaro de Sonja Lang)  | <b>mu</b>     | (bleko, aŭ alia besta sono aŭ komunikado)                          | <b>selo</b>    | ekstera formo, ekstera tavolo; ŝelo, haŭto; limo                                     |
| <b>akesi</b>            | ne-beleta besto; reptilo, amfibio                                     | <b>kule</b>     | koloro, bunta, pigmentita, pentrita  | <b>mun</b>    | luno, nokta ĉiela objekto, stelo                                   | <b>seme</b>    | kio? kiu?  |
| <b>ala</b>              | ne, nul   | <b>kulupu</b>   | komunumo, kompanio, grupo, nacio, socio, tribo   | <b>musi</b>   | arta, amuza, frivola, ludeca                                       | <b>sewi</b>    | spaco super io, plej alta parto de io, io pli alta; miriga, dia, sankta, supernatura |
| <b>alasa</b>            | ĉasi, kolekti   | <b>kute</b>     | orelo; aŭdi, aŭskulti; atenti, obei  | <b>mute</b>   | multaj, multe, pluraj, tre; kvanto; dudek (20)                     | <b>sijelo</b>  | korpo (de homo aŭ besto), fizika stato, torso  |
| <b>ale / ali</b>        | ĉio, ĉiuj, abunda, nenombrebla; vivo, universo; cent (100)            | <b>la</b>       | (inter la kunteksta frazoparto kaj la ĉef frazo)   | <b>n</b>      | hm, nu   | <b>sike</b>    | io ronda aŭ cirkla; pilko, cirklo, ciklo, sfero, rado; de unu jaro                   |
| <b>anpa</b>             | klinanta sin, malsupren, humila, modesta, dependa                     | <b>lanpan</b>   | (for)preni, (ek)kapti, ŝteli   | <b>namako</b> | spico, kroma, bonuso   | <b>sin</b>     | nova, plia, aldona   |
| <b>ante</b>             | malsama, ŝanĝita, alia  | <b>lape</b>     | dormanta, ripozanta  | <b>nasa</b>   | ne kutima, stranga; malserioza, stulteta; ebria                    | <b>sina</b>    | vi   |
| <b>anu</b>              | aŭ  | <b>laso</b>     | blua, verda  | <b>nasin</b>  | vojo, kutimo, doktrino, metodo, maniero                            | <b>sinpin</b>  | vizaĝo, antaŭ, muro  |
| <b>awen</b>             | tenata, konservita, protektita, sekura, atendanta, restanta; daŭranta | <b>lawa</b>     | kapo, menso; regi, direkti, gvidi, posedi, plani, reguligi   | <b>nen</b>    | tubero, butono, monteto, monto, nazo, elstarajo                    | <b>sitelen</b> | bildo, prezento, simbolo, markajo, skribaĵo  |
| <b>e</b>                | (antaŭ la rekta objekto)  | <b>leko</b>     | kvadrato, kubo, bloko, ŝtupo, briko  | <b>ni</b>     | (ĉi) tiu, (ĉi) tio   | <b>soko</b>    | fungo  |
| <b>en</b>               | (inter pluraj subjektoj)  | <b>len</b>      | ŝtofo, vestaĵo, teksaĵo; kovraĵo, tavolo de privateco  | <b>nimi</b>   | nomo, vorto  | <b>sona</b>    | scii, havi lerton / saĝon / informojn pri io; scipovi                                |
| <b>epiku</b>            | mojosa, mirinda   | <b>lete</b>     | malvarma; nekuirita, kruda   | <b>noka</b>   | piedo, kruro, moviga organo; malsupro, malsupra parto              | <b>soweli</b>  | besto, surtera mamulo  |
| <b>esun</b>             | merkato, butikoj, foiro, bazaro, komerca transakcio                   | <b>li</b>       | (inter iu ajn subjekto krom <b>mi</b> sola aŭ <b>sina</b> sola kaj ĝia verbo; ankaŭ enkonduki novan verbon por la sama subjekto) | <b>o</b>      | Hej! Ho! (vokativo aŭ imperativo)                                  | <b>suli</b>    | granda, peza, longa, alta; grava; plenkreskulo                                       |
| <b>ijo</b>              | aĵo, afero, fenomeno, objekto, materio                                | <b>lili</b>     | malgranda, mallonga; malmulta; iomete; juna  | <b>oko</b>    | okulo, vidkapablo  | <b>suno</b>    | suno; lumo, brilo, lumfonto  |
| <b>ike</b>              | malbona, negativa; neesenca, malgrava                                 | <b>linja</b>    | longa kaj fleksebla afero; ŝnuro, haro, fadeno   | <b>olin</b>   | ami, havi kompaton, respekti, montri korinklinon al                | <b>supa</b>    | horizontala surfaco, aĵo por meti aŭ ripozigi ion                                    |
| <b>ilo</b>              | ilo, maŝino, aparato  | <b>lipu</b>     | plata objekto; libro, dokumento, karto, papero, muzikdisko, retejo   | <b>ona</b>    | li, ŝi, ĝi, (ri), ili  | <b>suwi</b>    | dolĉa, bonodora; ĉarma, senkulpa, aminda   |
| <b>insa</b>             | centro, enhavo, eno, inter; ena organo, ventro, stomako               | <b>loje</b>     | ruĝa, ruĝeca   | <b>open</b>   | komenci; malfermi; ŝalti   | <b>tan</b>     | fare de, el, pro   |
| <b>jaki</b>             | naŭza, obscena, malsana, toksa, malpura, malhigiena                   | <b>lon</b>      | situante ĉe, ĉeestanta ĉe, reala, vera, ekzistanta   | <b>pakala</b> | fuŝita, rompita, difektita, damaĝita                               | <b>taso</b>    | sed, tamen; nur  |
| <b>jan</b>              | homo, persono, iu   | <b>luka</b>     | brako, mano, tuŝorgano; kvin (5)   | <b>pali</b>   | fari, priagi, prilabori; konstrui, prepari                         | <b>tawa</b>    | iranta al, al; por; laŭ la vidpunkto, moviĝanta                                      |
| <b>jasima</b>           | reflekti, renversa  | <b>lukin</b>    | rigardi, vidi, ekzameni, observi, legi, spekti; serĉi, provi   | <b>pan</b>    | io longa kaj rigida; branĉo, stango, bastono                       | <b>telo</b>    | akvo, likva, fluaĵo, malsekaĵo; trinkaĵo   |
| <b>jelo</b>             | flava, flaveca  | <b>lupa</b>     | pordo, truo, orifico, fenestro   | <b>pana</b>   | doni, sendi, havigi, meti, liberigi                                | <b>tenpo</b>   | tempo, daŭro, momento, okazo, periodo, situacio                                      |
| <b>jo</b>               | havi, porti, enhavi, teni   | <b>ma</b>       | tero, terpeco; eksterdomo subĉiela loko, mondo; lando, teritorio; grundo   | <b>pi</b>     | de   | <b>toki</b>    | komuniki, diri, paroli, uzi lingvon, pensi; saluton                                  |
| <b>kala</b>             | fiŝo, mara besto, mara vivaĵo   | <b>mama</b>     | gepatro, praulo; kreinto; prizorganto, bontenanto  | <b>pilin</b>  | koro (fizika aŭ emocia); sentanta (emocion, rektan sperton)        | <b>tomo</b>    | endoma spaco; konstruaĵo, hejmo, domo, ĉambro  |
| <b>kalama</b>           | fari sonon; reciti, elparoli laŭte                                    | <b>mani</b>     | mono, ŝparaĵo, riĉaĵoj; bruto, granda malsovaĝa besto  | <b>pimeja</b> | nigra, malhela, malluma  | <b>tonsi</b>   | neduuma, neduumulo, genre nekonforma persono, transgenrulo, interseksulo             |
| <b>kama</b>             | alvenanta, venonta, estonteca, kunvokita; iĝi, sukcesi                | <b>meli</b>     | virino, ino, edzino  | <b>pini</b>   | antaŭa, finfarita, finita, pasinta                                 | <b>tu</b>      | du   |
| <b>kasi</b>             | planto, vegetaĵo; herbo, folio  | <b>meso</b>     | averaĝo, modera, meza, mezgranda, mezkvalita, ordinara   | <b>pipi</b>   | insekto, formiko, araneo, eta senvertebrulo                        | <b>unpa</b>    | seksumi, amori   |
| <b>ken</b>              | povi, rajti, ebla   | <b>mi</b>       | mi, ni   | <b>poka</b>   | kokso, flanko; apud, proksimaĵo                                    | <b>uta</b>     | buŝo, lipoj, buŝa kavo, makzelo  |
| <b>kepeken</b>          | uzi, per, uzante  | <b>mije</b>     | viro, virseksulo, edzo   | <b>poki</b>   | ujo, sako, bovlo, skatolo, taso, ŝranko, tirkesto, vazo            | <b>utala</b>   | batali, defii, konkuri/lukti kontraŭ   |
| <b>kijetesan-takalu</b> | lavurso, musteloidoj  | <b>misikeke</b> | medikamento, kuracilo, kuraci, pilolo, medicina  | <b>pona</b>   | bona, pozitiva, utila; amika, paca; simpla; dankon                 | <b>walo</b>    | blanka, blankeca; helkolora, pala  |
| <b>kili</b>             | frukto, legomo, fungo   | <b>moku</b>     | manĝi, trinki, konsumi, gluti  | <b>pu</b>     | interagi kun la oficiala Tokipono-libro (lernolibro de Sonja Lang) | <b>wan</b>     | unika, kunigita; unu   |
| <b>kin</b>              | ja, ankoraŭ, ankaŭ, cetere  | <b>moli</b>     | mortinta, mortanta   | <b>sama</b>   | sama, simila; unu la alia; gefrata, kunulo; kiel                   | <b>waso</b>    | birdo, fluganta vivaĵo, flugilhava besto   |
| <b>kipisi</b>           | dividi, fendi, tranĉi, dividaĵo, tranĉo, parto                        | <b>monsi</b>    | malantaŭo, dorso   | <b>seli</b>   | fajro; varmiga elemento de kuirilo, kemia reago, varmfonto         | <b>wawa</b>    | forta, potenco; memfida, certe; energia, intensa                                     |
| <b>kiwen</b>            | malmolaĵo, metalo, roko, ŝtono  | <b>monsuta</b>  | timiga, timigaĵo, monstro, timinda sovaĝbesto, demono, maltrankviliga  |               |  | <b>weka</b>    | neĉeestanta, fora, ignorata  |
| <b>ko</b>               | argilo, kunteniĝanta/glueca formo, pasto, duonsoldaĵo, pulvoro        |                 |  |               |  | <b>wile</b>    | devi, bezoni, devus...i, postuli, deziri   |
| <b>kokosila</b>         | krokodilo (paroli alian lingvon ol Tokiponon en Tokipona medio)       |                 |  |               |  |                |  |
| <b>kon</b>              | aero, spiro; esenco, spirito; kaŝita realaĵo, nevidata agento         |                 |  |               |  |                |  |